

V-644/3

ESPERANTYSTA POLSKI
ESPERANTISTO POLA

ESPERANTO
 LINGVO
 INTERNACIA



SIMPLA, FLEKSEBLA, BELSONA, VERE INTERNACIA EN SIAJ ELEMENTOJ LA LINGVO
ESPERANTO PREZENTAS AL LA MONDO CIVILIZITA LA SOLE VERAN SOLVON DE
 LINGVO INTERNACIA.

PROSTY, GIĘTKI, DŹWIĘCZNY, PRAWDZIWIE MIĘDZYNARODOWY
 W SWOICH PIERWIASTKACH JĘZYK

ESPERANTO

PRZEDSTAWIA ŚWIATU CYWILIZOWANEMU JEDYNE PRAWDZIWE ROZWIĄZANIE
 KWESTJI JĘZYKA MIĘDZYNARODOWEGO.

CAŁA GRAMATYKA ESPERANCKA SKŁADA SIĘ Z 16 PRAWIDEŁ BEZ WSZELKICH WYJĄTKÓW, A SŁOW-
 NIK—Z PARU TYSIĘCY PIERWIASTKÓW I TRZYDZIESTU PARU PRZYBRANEK (SUFIKSÓW) I PRZYSTA-
 WEK (PRÉFIKSÓW), PRZY POMOCY KTÓRYCH TWORZY SIĘ NADER BOGATY JĘZYK O NIEZLICZO-
 NEJ ILOŚCI SŁÓW POCHODNYCH, ZDOLNY WYRAZIĆ NAJSUBTELNIJSZE ODCIENIA MYŚLI I UCZUĆ
 LUDZKICH.

NAUCZENIE SIĘ GRAMATYKI JĘZYKA „ESPERANTO” BEZ NAUCZYCIELA WYMAGA NAJWYŻEJ GODZINY
 CZASU.—KILKA TYGODNI RZETELNEJ PRACY PO PARĘ GODZIN DZIENNE WYSTARCZA DO GRUNTOWNEGO
 NAUCZENIA SIĘ TEGO JĘZYKA.—BIEGŁOŚCI W MOWIE I PISMIE MOŻNA NABRAĆ W CIĄGU KILKU MIE-
 SIĘCY, CZYTAJĄC ESPERANCKIE PISMA I KSIĄŻKI I PROWADZĄC Z ESPERANTYSTAMI KORESPONDENCJĘ.

!UCZMY SIĘ ESPERANTA!

„Esperantysta Polski”

Miesięcznik, Organ Esperantystów Polskich

Roczna prenumerata wynosi w r. 1910 rb. 2.50 k.
wraz z przesyłką pocztową.

Adres: Administracji—Warszawa, Hoża 20,
Redakcji—Zielna 15.

„Pola Esperantisto”

Monata Organo de Polaj Esperantistoj

Jara abonpago en 1910 jaro 2 r. 50 k. (2,65 Sm.)
kun la poŝta transsendo.

Adreso de Administr: Varsovio, str. Hoża 20,
de Redakcio—str. Zielna 15.

En la Administracio de „POLA ESPERANTISTO” estas acetebraj

„LA JUGO DE OZIRIS” — belega satira majstro-
verkode Henryk Sienkiewicz, tr. A. Grabowski 25 k.

„PROTESILAS KAJ LAODAMIA”. Tragedio de St.
Wyspiański, trad. D-ro Leono Zamenhof — 50 k.

„AVE PATRIA, MORITURI TE SALUTANT” de Wła-
dysław Reymont, trad. D-ro Leono Zamenhof 25 k.

„CONSILIUM FACULTATIS” unuakta komedio de J.
A. Fredro, trad. el pola lingvo A. Grabowski. 40 k.

„KELKAJ NOVELOJ” el diversaj aŭtoroj. Trad. A. Os-
sowski, H. Hempel, Kuhl, Gorgan, N. Kordo. 25 k.

„IMPROVIZACIO de KONRAD” el „Dziady de A. Mło-
kiewicz, trad. Roman Iwo Dobrzański — 25 k.

„JĘZYK MIĘDZYNARODOWY ESPERANTO”, arkusz
propagacyjny, — 2 k., 100 egz. 1.20 k.

„SŁOWNIK ESPERANCKO-POLSKI” na jednym arku-
szu do naklejenia na tekturę. Naklejony 25 kop.
nienaklejony 15 kop.

„KIO OKAZIS FOJE EN SIDONO” — novelo de
H. Sienkiewicz, tradukis A. Grabowski — 25 k.

„EN FUMEJO DE L’ OPIO” — novelo de Władysław
Reymont, tradukis D-ro K. Bein (Kabe) — 20 k.

„NOVA ANTOLOGIO” kolekto de poemoj de divers-
aj poetoj, tradukis A. Grabowski. — 25 kop.

„NI SEKVU LIN” de H. Sienkiewicz. Tradukis Br.
Kuhl. (64 paĝ.) — 40 k.

„MIA LIRO”, kolekto de poemoj de D-ro Leono Za-
menhof (Lozo) — 25 kop.

„ADRESARO de POLAJ ESPERANTISTOJ” 1909 J. Pri-
laboris A. B. Brzostowski — 30 k.

„KLUCZ ESPERANTO” de Ĉefeĉ, pola eldono, —
2 kop., 50 egz. — 80 k.; 100 ekz. — 1 rb. 50 k.

„SŁOWNIK ESPERANCKO-POLSKI” w broszurze, pod
red. D-ra L. Zamenhofs, wydanie „POLA ES-
PERANTISTO”. Cena 20 kop.

Jarkolekto 1908 de „Pola Esperantisto”—broŝurita \$ 1.50.
Jarkolekto 1909 de „Pola Esperantisto”—nebroŝurita \$ 2. —

Por la Abonantoj de „POLA ESPER.” la supre signitaj prezoj estas malgrandigataj.

Od Administracji „Pola Esperantisto”.


Uprasza się p. p. prenumeratorów o zawiadamianie Administracji „Esp. Pol.” (Ho-
ża 20) o zmianie adresu. Nieregularny odbiór pisma bywa prawie wyłącznie skutkiem nie-
zakomunikowania nowego adresu.

Ekspedycję pisma dla członków „Pol. Tow. Esp.”, uskutecznia Zarząd T-wa,
upraszamy więc ze wszystkimi reklamacjami zwracać się do p. Bibliotekarza Towarzy-
stwa (Koszykowa 37).


Ze wszelkimi reklamacjami prosimy zwracać się tam, gdzie została opłacona pre-
numerata. Administracja bezpośrednio przyjmuje reklamacje tylko od tych pp. prenume-
ratorów, którzy nadesłali swe zamówienia i prenumeratę wprost do Administracji „Pola Esp.”

POLA ESPERANTISTO

Monata Organo de Polaj Esperantistoj



ESPERANTYSTA POLSKI



Organ Esperantystów Polskich

Aprilo-Majo 1910.

WARSZAWA—VARSOVIO.

Jaro III (V) Nr. 4-5

Antoni Grabowski.

Słownik języka Esperanto.

Obszerny słownik polsko-esperancki, tak dawno wyczekiwany przez esperantystów Polaków, nareszcie ujrzał światło dzienne.

Antoni Grabowski, który zadał sobie to niełatwe do wykonania zadanie, poświęcił swemu słownikowi kilka lat uporczywej i wytrwałej pracy.

Ruch esperancki w Polsce zaczął rozwijać się dopiero od lat kilku. Przez ten krótki stosunkowo czas zdołaliśmy dzięki zabiegliwej energii p. Jana Günthera wydać wiele drobniejszych podręczników i słowników, przeznaczonych głównie dla propagandy. Dziś, kiedy ruch ten zdążył już znacznie spotężnić i coraz więcej w ogólnej literaturze esperanckiej zjawiają się dzieła z pod pióra Polaków, brak obszernego słownika polsko-esperanckiego dawał się nieraz dotkliwie odczuwać.

Przewidując taki stan rzeczy, Antoni Grabowski, najstarszy pionier idei esperantyzmu w Polsce, jeszcze przed 6 laty zaczął gromadzić materiał do obszernego słownika dla Polaków. Nie przewidywał on, że praca ta pochłonie tyle czasu. Świat esperancki, który jeszcze przed 2 laty otrzymał pierwszy zeszyt tego słownika i który utyskiwał

na powolność wydawnictwa, dziś zapewne, mając w ręku obszerne dzieło p. Grabowskiego, zrozumie sam, że taka praca, jaką włożył autor, wymaga koniecznie dużego nakładu czasu.

Nie podajemy w tym miejscu oceny słownika p. A. Grabowskiego, poświęcimy jej w przyszłości obszerniejsze sprawozdanie, dziś zaznaczamy tylko ten fakt, który dla idei naszej w Polsce niezawodnie w przyszłości odegra bardzo ważną rolę.

Słownik Antoniego Grabowskiego jest nie tylko obszernym słownikiem wyrazowym, lecz również wyczerpującym słownikiem frazeologicznym, co przy dzisiejszym rozwoju literatury esperanckiej staje się już nieodłączną częścią każdego obszerniejszego słownika.

Polskie piśmiennictwo esperanckie może być dumne z dzieła p. Grabowskiego. Odpowiada ono nie tylko wszelkim wymaganiom wzorowych tego rodzaju wydawnictw, lecz niezawodnie jako jeden z najobszerniejszych słowników esperanckich, będzie ono na dłuższy czas służyło znakomitym wzorem słowników języka esperanckiego dla różnych narodowości.

Pri kalendara reformo.

La Komitato de internaciaj Kongresoj de la Komercaj Ĉambroj, kaj la Komercaj kaj Industriaj Asocioj metis en la tagordon de sia proksima tutmonda kongreso (Londono, Junio 1910), jenajn temojn:

„Malgrandigo de la datodiferencoj de la Paska festo“.

„Unuecigo kaj simpligo de la gregoria kalendaro“.

La komitato de la Nederlanda societo prezentas al la Kongreso sekvantajn proponojn:

1. La Unua Paska tago estu fiksata je la 1-a dimanĉo de Aprilo (deziron jam esprimita de la „*Deutscher Handelstag*“).

2. Por la bono de komerco kaj industrio, la gregoria kalendaro estu simpligita, laŭ modelo de kalendaro prikskribita de Prof. Grosclaude, Genevo.

3. La enkonduko de tiel reformita kalendaro estu kiel eble plej vastigota.

Klarigaj notoj:

Oni ne bezonas longe klarigi la deziron rilate al la Paska festo. Intere estas legi pri tiu demando, kiu dum jarcentoj okupadis la astronomiistojn, la teologiistojn, la komercistojn, la klaran kaj dokumentitan raporton de „*Deutscher Handelstag*“, ĉe la 3-a internacia Kongreso de la Komercaj Ĉambroj en Praha 1908. La konkludo estis, ke estus dezirinde fiksi la Paskan feston je la 1-a dimanĉo post la 4-a de Aprilo.

La datvariado, kiu povas nun esti 35 tagoj (inter la 22-a de Marto kaj la 25-a de Aprilo) estus tiel reduktita ĝis 7 tagoj inter la 5-a kaj la 11-a de Aprilo).

Kvankam tio ĉi jam estus grava plibonigo, tamen, oni povus havi ankoraŭ pli bonan rezultaton, t. e. ne ŝanĝeblan daton por la Paska tago kaj samtempe por ĉiuj specialaj tagoj de l' jaro, kiel la memor- aŭ fest-tagaj naciaj kaj religiaj, la folraj tagoj, la tagoj por rekomenco de lernejoj kaj kursoj post libertempo ktp.

Tia neŝanĝeco povas esti akirita per kalendaro en kiu la jaro ĉiam komenciĝas la saman tagon, kaj ne varias kiel estas nun.

La gregoria kalendaro (same kiel la juliana, de kiu ĝi devenas kaj distingiĝas de tiu ĉi nur per la pli oftaj supertagoj), krom tiu datŝanĝo de la novjara tago, enhavas ankoraŭ aliajn mankojn, kiuj estus samtempe korektitaj.

En la negocoj, kie la pagotaj salajroj reprezentas gravan elementon de la konto „Gajnoj kaj perdoj“ estus avantaĝo se la jaro havus ĉiam 52 egalajn pagsemajnojn.

Cetere la komerco jam ne akordiĝas en uzado de la kalendaro. Ekzemple en la banknegoco de la plimultaj landoj eŭropaj, la jaro estas kalkulata je 12 monatoj, kun po 30 tagoj por la deponaj kaj kurantaj kontoj.

Male, oni kalkulas la ekzaktan nombron da tagoj por la diskontado de trajtoj.

Jen seriozaj malfacilaĵoj, kiujn la kalendaro de Prof. Grosclaude nepre forigus.

Laŭ tiu ĉi kalendaro la jaro konsistas el la novjara tago kaj 12 monatoj aŭ 52 semajnoj. La 52 semajnoj estas dividitaj en 4 kvaronoj kun ĉiu 13 semajnoj aŭ 91 tagoj dividitaj inter 3 monatoj kun sinsekve 30, 30 kaj 31 tagoj.

Se la 1-a de Januaro (t. e. la tago post novjaro) estos nomata **l u n d o**, la 31-a tago de la monatoj Marto, Junio, Septembro kaj Decembro estos dimanĉo, tiamaniere ke la monatoj kun 31 tagoj havos unu dimanĉon plie ol la monatoj kun 30 tagoj, sed egalan kvanton da labortagoj, kaj tio estas por la komerco kaj industrio sufiĉe grava afero. La „supertago“ estus enmetita inter la 30-a de Junio kaj la 1-a de Julio.

Resuma tabelo de la nova nevariebla kalendaro.

1-a kvaronjaro 2-a „ 3-a „ 4-a „	Januaro Aprilo Julio Oktobero				Februaro Majo Aŭgusto Novembro					Marto Junio Septembro Decembro					
Novjara tago	0														
Lundo	1	8	15	22	29	—	6	13	20	27	—	4	11	18	25
Mardo	2	9	16	23	30	—	7	14	21	28	—	5	12	19	26
Merkredo	3	10	17	24	—	1	8	15	22	29	—	6	13	20	27
Ĵaŭdo	4	11	18	25	—	2	9	16	23	30	—	7	14	21	28
Vendredo	5	12	19	26	—	3	10	17	24	—	1	8	15	22	29
Sabato	6	13	20	27	—	4	11	18	25	—	2	9	16	23	30
Dimanĉo	7	14	21	28	—	5	12	19	26	—	3	10	17	24	31

Ĉiuj ĉi-supre menciitaj mankoj estas forigitaj per tiu ĉi kalendaro, kiun oni povus adopti sen okazigi grandan ŝanĝon en niaj kutimoj.

Simpla ekrigardo sufiĉas por konstati la avantaĝojn:

Ĉiuj kvaronjaroj estas egalaj, ĉiu monato havas la saman nombron da labortagoj, la 1-a kaj la 15-a de ĉiu monato, kiuj ĝenerale estas gravaj datoj en la komerco kaj ordinara vivo, neniam estas dimanĉoj; granda facileco kalkuli parkere ĉiujn dimanĉojn; la 31-a finiĝas ĉiun kvaronjaron kaj estas ĉiam dimanĉo.

Tiu ĉi kalendaro naskigas unu solan malgrandan malfacilecon, t. e. grandan nombron da festotagoj dum la lasta parto de Decembro. Ĉar la 24-a de Decembro estas dimanĉo, sekvas ke en landoj, kie la dua Kristnaska tago estas laŭleĝa festo, tri festotagoj okazus seninterrompe, kaj poste venas la Silvestra tago, kiu ankaŭ estas dimanĉo kaj Novjara tago.

Tamen la kutimo decidus ĉu, en tiaj cirkonstancoj, la dua Kristnaska tago devus resti oficiala festo. Aliflanke la personoj, kiuj havas la kutimon havi libertempon dum la lasta semajno de l' jaro por sin dediĉi al la familia vivo, nenion riproĉos pri la multeco de l' festotagoj dum tiu periodo.

Rilate al la Paska festo la nova kalendaro alportas tre kontentigan solv-

on. Se oni adoptus ĝin, la unua Paska tago ĉiam estus la unua dimanĉo de la dua kvaronjaro; kaj tio estus tre favora dato por tiu tre grava momento de l' jaro laŭ vidpunktoj de l' komerco de l' industrio kaj de l' instruo lerneja en multaj landoj!

Jam de tre longe oni ofte proponis plibonigojn de la kalendaro. Unu el la plej konataj provoj estis la reguligo enkondukita sekve de la franca revolucio kaj kiu eĉ dum kelkaj jaroj estis praktike uzata.

Laŭ tiu kalendaro la jaro havis 12 monatojn de 30 tagoj, ĉiu monato estis dividita en 3 dektagaj semajnoj, kiuj anstataŭis la septagajn. La tago havis 10 horoj dividitajn en 100 minutoj po 100 sekundoj. La monatoj havis tute novajn nomojn kaj la 5 aŭ 6 komplementaj tagoj estis eldonataj al la lasta monato.

Tiu kalendaro vivis nur 13 jarojn. Ĝia enkonduko ne devenis de internacia interkonsento kaj sen ĝi estas neeble krei ion daŭran en tia rilato.

La motivo de la unua movado por kalendara reformo, tute ne estas malamo al tio, kio nun ekzistas, nek malŝato de religiaj tradicioj, sed nura deziro ĝeneraligi kaj simpligi por la bono de l' komerco kaj industrio kaj en formo, kiu respektas tiujn tradiciojn.

S-ro Profesoro Wilhelm Foerster interesigis por tiu movado, krom multaj

gravaj asocioj kaj institutoj, la papan Moŝton kaj la estraron de la katolika eklezio, kies apogo estas necesa en tiu afero.

Proponante simpligon de nia kalendaro oni esperas samtempe kunlabori por ĝia unuformigo, jetante kvazaŭ

ponton al Rusujo. Efektive la adoptado de simpligita kalendaro anstataŭ la gregoria plifaciligos por la slavoj la interkonsenton kun la aliaj Eŭropaj kaj Amerikaj popoloj, ĉar tiel komuna kalendaro *por ĉiuj* estos kreita.

El „Germana Esperantisto” Nr. 74.

Lev Tolstoj.

Avarulo.

Mortis riĉulo. La tutan vivon li estis avara, kaj kolektis grandan riĉaĵon.

— Oni ne povas agi alie—respondis li, kiam oni riproĉis al li avarecon — dum la vivo mono estas ĉio.

Kaj, kiam proksimiĝis la horo de l' morto, li pensis:

Same en la alia mondo mono estas ĉio. Mi devas provizi min, por ke mi ne ekkonu mizeron.

Li kunvokis la infanojn kaj adiaŭante ilin, ordonis enmeti en sian ĉerkon sakon kun mono.

— Ne domaĝu—li aldonis—enmetu kiel eble plej multe.

Kaj nokte li mortis.

La infanoj plenumis lian volon kaj enmetis en la ĉerkon kelkajn milojn da oraj rubloj.

Kiam la mortinto estis enterigita kaj kiam la riĉulo eniris en la alian mondon komenciĝis ordinaraj demandoj kaj enskriboj en diversajn librojn. Oni turmentis lin tutan tagon, ĉar en alia mondo ankaŭ estas skribejoj, adresoficejoj kaj aliaj ejoj.

Li atendis senpacience la vesperon. Li estis malsata, kiel lupoj kaj ŝajnis al li, ke li brulas pro soifo. Lia gorĝo sekiĝis, lia lango velkiĝis.

— Mi pereos! — pensis li.

Subite li ekvidis bufedon, provizitan de diversaj manĝoj kaj trinkoj, tiel same, kiel en granda stacidomo. Oni povis trovi tie ĉion por manĝi kaj trinki. Eĉ sur kuirileto io sin rostis.

— Ho, li diras al si, mi povas min mem laŭdi. Mi antaŭvidis, ke tie ĉi

estas same, kiel ĉe ni! Kaj kiel bone mi faris, ke mi prenis monon! Nun mi plenigos mian ventron per la manĝoj kaj trinkoj.

Goje li palpis la saketon kun oro kaj proksimiĝis al la bufeto.

— Kiom kostas unu? — demandis li necerte, montrante sardelojn.

— Po kopeko — respondis la bufedisto.

— Malkare, pensas la riĉulo. Mi petas pli.

— Kaj tio? — demandas li ree, montrante per la fingro apetindajn varmegajn pasteĉojn.

— Ankaŭ po kopeko — respondas la bufedisto kaj ridetas.

— Do — diras la riĉulo — mi petas doni al mi sur telereto dek sardelojn, kvin pasteĉojn, kaj eble ankoraŭ...

Avide rigardis li la apetindajn manĝojn, serĉante ankoraŭ ion.

La bufedisto aŭdis, sed ne rapidis plenumi lian postulon.

— Ĉe ni oni pagas tuj — li respondis severe.

— Pagi? Kun plezuro.

La riĉulo elpoŝigis oran kvinrublon.

— Mi petas.

La bufedisto ekrigardis la moneron ĉiufanke.

— Ne — li diris — tio ne estas tia kopeko.

Kaj li redonis al la riĉulo la moneron kaj alvokis servistojn. Du grandegaj viroj forkondukis la riĉulon flanken.

Li ĉagreniĝis kaj koleriĝis.

Ho, kia klopodo — pensis li. Ĉu

ili akceptas nur kopekojn? Mirinde!
Mi devos ŝanĝi.

Li kuris al la filoj kaj dum ilia dormo, ordonis al ili:

— Reprenu la oron. Ĝi ne estas al mi necesa. Anstataŭ oro enmetu en mian ĉerkon saketon da kopekoj. Alie mi pereos.

La terurigitaj filoj faris plej proksiman tagon, kio ordonis la patro kaj enmetis saketon da kopekoj.

— Mi havas — krias la riĉulo ĝoje — kaj kuras al la bufedisto.

— Donu al mi rapide manĝi, mi estas tre malsata.

— Ĉe ni oni pagas tuj! — same, kiel antaŭe — respondas la bufedisto.

— Mi petas, mi petas — respondas la riĉulo kaj donas al li tutan manon da novaj kopekoj.

— Mi petas nur — donu plej rapide.

La bufedisto ekrigardis la moneron kaj ekridetis.

— Mi vidas, ke vi malmulte lernis tie sur la tero. Ni ne prenas tiujn kopekojn, kiujn vi havas, sed tiujn, kiujn vi donis vivante al la mizeruloj. Rememoru vi, eble vi donacis ion al mizeruloj?


La riĉulo mallevis la okulojn kaj enpensiĝis.

Neniam li donis ion, al neniu li ion oferis.

Du grandegaj servistoj forkondukis la riĉulon flanken.

Esperantigis

Leopoldo Kronenberg.



Edzinigo de Ratino.

(El Japana lingvo).

Maljuna rato havis filinon. Ĝi volis edzinigi tiun ĉi kun iu plej forta en la mondo. Ĝi unue iris al la luno pensante, ke la luno estas la plej forta en la mondo. Sed la luno diris: „Min tre ofte malhelpas la nubo, kaj mi neniel povas forpeli ĝin”.

Tiam ĝi turnis sin al la nubo, pensante, ke la nubo estas pli forta ol la luno. Sed la nubo diris: „Min ĉiam dispelas la vento, kaj mi neniam povas al ĝi kontraŭstari”.

Trie ĝi iris al la vento, pensante, ke la vento estas pli forta ol la nubo.

Sed la vento diris: „La muro staras kontraŭ mi kaj mi tute ne povas trapasi ĝin”.

Fine ĝi iris al la muro, pensante, ke la muro estas pli forta ol la vento. Sed la muro ankaŭ diris: „Via familio ĉiam min mordadas, kaj mi ne povas tion haltigi”.

Jen ĝi komprenis, ke ratino nur devas edziniĝi kun rato kaj reveninte hejmon, ĝi edzinigis sian filinon kun juna rato de sia najbareco.

K. Kajiwara.

(El „Japana Esperantisto” Nr. 4, 1909).



Kiam iris reg' militon...*)

(El Marja Konopnicka).

Kiam iris reg' militon,
Ludis trumpetar' eksciton,
Ludis trumpetar' el oro,
Por la venko, por fervoro!

Kiam iris Staŝ batalon,
Bruit fontoj vek-signalon,
Bruit de la spikoj spiro,
Por malbona sort', sopiro...

Kugloj tranĉas la aeron,
Per kadavroj sternas teron;
Reĝoj brave jen batalas:
Vilaĝanoj dense falas.


Flirtas vente reĝa flago;
Knaras ie kruco voja...
Staŝon vundis morta sago,
Reĝo hejm-revenas, ĝoja.

Reĝon en pordego ora
Eksalutis bril' aŭrora;
Sonoriloj eksonoris,
La venkinton laŭte gloris.

Kiam Staŝon tero prenis,
En la kampo vent' orgenis,
Plende kantis la tremoloj,
Sonoretis — kampanoloj...

Trad. A. Grabowski.

*) Muziko de Noskowski.



Do kiam estos vi edzino...*)

(El Kazimierz Tetmajer).

Do kiam estos vi edzino
Amata mia, laŭ destino,
Por ni malfermos sin ĝardeno,
Brilplena, luma ter-edeno.

Por ni aromon spiros floroj,
Vinberaj fluos bonodoroj,
Kaj de cejanoj kaj rozaro
Kisata estos via haro.

Ni iros sole, enmedite,
De sunradioj or-pentrite,
Kaj inter arboj, senparole,
Promenos ni kviete, sole.

Al ni branĉetoj verdaj pendos,
Narcisoj supren sin etendos,
Kaj per falanta flor' tilia
Kovriĝos kara kapo via.

Mi vin per blankaj rozoj kronos,
Per miozotoj blue zonos,
Ornamos per filik' magia,
Kaj mondon faros pli radia.

Ni iros sole, enmedite,
De sunradioj orpentrite...
Por ni al tiu mir-ĝardeno
Malfermos pordon amo-pleno.

Trad. A. Grabowski.

*) Muziko de Żeleński aŭ Walter.



Internaciaj signoj por metrosistema mezuroj.

Estas tre grava en la tekniko, ke oni akceptu kiel eble plej rapide signojn (simbolojn), kiu estos kompreneblaj en tutmondo. Ĉar, nun, ĉiu lando havas siajn signojn, kio estas tre nepraktika kaj povas kaŭzi erarojn.

Plej grava el ĉio estas la signoj de kuranta, kvadrata kaj kuba simboloj.

„La Societo de germanaj inĝenieroj“ prilaboris perfektan libron „Hütte“, kiu fariĝis modelo kaj estis nun tradukita en multe da lingvoj.

En ĉi libro oni elektis tre mallongajn, laŭcelajn kaj perfektajn simbolojn. Sed, kompreneble, en la tradukoj oni aŭ ne povis apliki ĉi perfektajn simbolojn, aŭ ne pensis doni al ili internacian skribmanieron.

Ekzemple: laŭ „Hütte“ oni skribas kvadratmetro — qm, kubmetro — cbm; kontraŭe, laŭ pola „Technik“ — m², m³, ktp.

Ĉe kalkuloj estas ĉiam pli oportune kaj agrable, skribi simbolojn per literoj, ol per literoj kaj ciferoj samtempe. Krom tio, ne skribante ciferojn en simboloj, ni atingas pli grandan klarecon, ĉar la ciferoj de simboloj ne miksiĝas kun ciferoj de nombroj. Ekzemple:

2 qm.2 aŭ 18 cbm.3;
2 m².2 aŭ 18 m³.3.

Ni vidas tuj, ke la unua skribmaniero estas pli oportuna. Ĉe la presado tio ne estas tiel videbla, kiel ĉe skribado, speciale, se iu skribas nelegeble, tiam, eraroj povas okazi ofte.

Por eviti erarojn, la uzado de literaj simboloj estas tre grava kaj tre oportuna.

Samtempe la simboloj devas esti mallongaj kaj koncizaj, por ke ili estu oportunaj en skribado.

Oni povus akcepti modelajn simbolojn, elektitajn en „Hütte“, ĉar tiuj ĉi simboloj jam estas kompreneblaj en la tutmondo. Sed ekzistus unu malhelpo, kiu ne permesas uzi tiujn ĉi simbolojn en Esperanto. Tio estas, ke „Esperanto“ ne posedas literon *q*. Pro tio estas ab-

solute necese apliki malgrandan ŝanĝon en skribmaniero.

En la sekvanta tabelo ni vidas plej klare jenan ŝanĝon:

NOMO	Simbolo	
	laŭ Hütte	internac.
kilogramo	kg	kg
gramo	g	g
miligramo	mg	mg
centnaro = 50 kg.	z	c
ducentnaro (duobla centnaro) = 100 kg.	dz	dc
tonno	t	t
litro	l	l
hektolitro	hl	hl
metro	m	m
centimetro	cm	cm
milimetro	mm	mm
kvadratmetro	qm	km
kvadratcentimetro	qcm	kcm
kvadratmilimetro	qmm	kmm
kubmetro	cbm	cbm
kubcentimetro	ccm	ccm
kubmilimetro	cmm	cmm
kilometro	km	klm
kvadratkilometro	qkm	kklm
aro	a	a
hektaro	ha	ha

Sekve, la tuta ŝanĝo estus bazita nur sur la uzado de litero *k* anstataŭ neekzistanta *q* (kvadrat anstataŭ quadrat), kaj sur la signado de kilometrsimbolo per *klm* (3 leteroj) anstataŭ *km* (2 leteroj), ĉar laŭ la nova internacia simbolsignado, *km* ne signifas pli kilometro (*klm*), sed signifas kvadratmetro (*km*).

Oni uzas mezuron *kvadratmetro* senĉese en ĉiutaga vivo kaj en tutaj teknikaj kalkuloj (ĉe meĥaniko, ĉe industrio ktp.); sekve, la *kvadratmetrsimbolo* necese devas esti tre mallonga kaj oportuna. Kontraŭe oni uzas mezuron *kilometro* pli malofte (ĉe fervojoj, astronomio ktp.); sekve oni povas uzi

iom pli longan simbolon, kiel ĉe *kvadratmetro*, des pli, ke ne estas komplete malfacile skribi *klm* per 3 leteroj, ekzemple — *253 klm*.

Ĉar la mezuron *kvadratkilometro* oni uzas nur en specialaj okazoj, ne estas eksterordinare grava, se tiu ĉi simbolo estos skribata per 4 leteroj, anstataŭ per 3, kial tio estas nun uzata en la libro „Hütte“.

Mi prezentas tiun ĉi gravan demandon al publika diskuto en diverslandaj esperantistaj gazetoj kaj esperas, ke nia pariza centra lingva komitato, post aŭskulto de gazetaj opinioj, baldaŭ definios kaj decidos la internaciajn simbolojn kaj publikigos ilin por universala uzado.

Ig. TEJCHFELD.

Pri esperantista fonda kapitalo.

Sub tia titolo en № 1—2 de nunjara „Pola Esperantisto“ aperis artikolo, en kiu S-ro Dworski, proponas kolektadi kapitalon por esperantista Centra Oficejo per disvendado de markoj po 0,25 \$^s. Ideo estas tre bona, sed, bedaŭrinde, malfacile plenumbla. Oni povas ĉiujare trovi kelkdekojn da esperantistoj, kiuj bonvolos aĉeti markojn, donantajn nenian personan utilon. Sed tiel kolektita sumo ne fondos bezonan kapitalon. Krom tio mi supozas, ke malfacile estos ankaŭ trovi volontulojn, dezirantajn vendadi senvalorajn markojn.

Ni scias tre bone, ke idealistoj (al kiuj mi kalkulas personojn, subtenantajn nian Centran Oficejon) estas tre malmultaj sur la terglobo, plimulto da ni estas materialistoj, kiuj por sia groŝo volas ricevi ian utilon.

Tiel pensante pri parolata afero, mi supozas, ke plibone estos sin apogi sur plimulto da esperantistoj kaj doni al ili certan ekvivalenton por iliaj kotizaĵoj.

Volonte plenumante la deziron de la estimata redakcio ni diskutadis pri la demandoj starigita de S-ro Dworski kaj antaŭe ĉiu diris: necese estas scii kiel granda devas esti la fonda kapitalo? Tio-ĉi dependas de la celo. Sekve: la centraj oficejoj devas klarigi iliajn intencojn aŭ planojn kaj dislimigi kion ili havas fari, kion privataj esperantaj asocioj?

Mi proponas do, ke abonpago por ĉiu ĵurnalo esperanta estu pligrandigita je 0,36 \$^s, kaj tiel kolektitan sumon ĉiu redakcio transsendu al U. E. A. Tiamaniere ĉiu abonanto povos ricevi, kiel ano de U. E. A., praktikajn servojn de tiu-ĉi institucio, kaj nia Centra Oficejo baldaŭ ne bezonos privatajn oferojn kaj eĉ kolektos sufiĉan kapitalon.

Tiela realigo de la afero dependas nur de la konsento de esperantaj redakcioj mem kaj ŝajnas al mi estas pli plenumbla tiamaniere, ol laŭ la proponoj de S-ro Dworski.

J. Żenczykowski.

De la Redakcio. Ni publikigas la projektion de D-ro Żenczykowski kaj kune kun la projekto de S-ro Dworski ni prezentas al la opinio de la esperantistaro. Ni volonte presos ĉiun novan projekton, koncernantan la fandan kapitalon de esperantistoj, kiu laŭ nia opinio meritas seriozan pridiskutadon.

Tie ĉi alvenos la fundamenta demando pri la organizacio de l' esperantaro. Ĉu maturiĝas la tempo por la definitiva centraligado?

L' Esperanto pretendas almiliti tutan teran globon. Jam nune la vastiĝo sur la supraĵo de nia planeto de esperantistoj, kaj de diversaj esperantaj organizacioj, estas tre granda. Des pli estas malfacila la centraligado. Ĉi ne

devas esti artefarita, sed naskiĝi per si mem.

Nature estas, ke la literaturo esperanta antaŭ ĉio unuigas l' anaron. Se la ĉefaj organoj literaturaj de esperantistoj altiros kunlaborantojn de la plej progresemaj diverslandaj homoj kaj el tiaj-ĉi organoj oni ricevas novaĵojn necesajn, utilajn, interesajn ktp., tiaj-ĉi organoj akiros grandan nombron da abonantoj kaj da necesaj fondoĵoj.

Kaŭze tiu-ĉi tasko ne estus bone plenumota la abonantaro malgrandiĝus kaj tio ĉi montrus, ke io devas esti farita... Inter la kondukantoj kaj la kondukatoj senĉese subtenus viva interligo.

Per tia maniero ĉiam kreskadas grandaj homaraj ligoj.

Apud la literaturo povas naskiĝi multaj aliaj aferoj sur la fundamento esperanta, ekzemple: — eldono de enciklopedio, fondo de l' universitato ktp., kiaj aferoj povas postuli multe da mono.

Simila afero, se ĝi respondas al

ĉiuj deziroj, aperas en justa tempo, laŭ la demandoj de la progreso — tia afero enspiros ne nur la tutmondan Esperantistaron, sed eĉ aliajn intelligentajn sferojn.

Ekzemple ni vidas kian sukceson havis la entrepreno de generalo Bots aŭ de la negro Buker Vaŝington (universitato de taskegi).

Kiajn grandajn sumojn donadas miliarderoj d' Usono se ili trovas, ke la celo meritas la elspezojn.

Ni pensas, ke la centraligado ne estas utila al la esperantaro; — ke la centraj oficejoj devas ekzisti por efektiviĝi diversajn specialajn celojn. La mono alfluos laŭ la taŭgeco kaj la ĉarmeco de tiuj-ĉi celoj!

Por kolekti la monon inter multaj aliaj manieroj povus esti, uzota la propozita de S-ro Dworski, kiel tre praktika, kaj simpla.

Vladivostoka Societo „Espero”.

Al niaj legantoj kaj kunlaborantoj.

Tiu ĉi numero bedaŭrinde aperas kun granda malfruo. Eble multaj sciigoj, kiuj estis jam kompostitaj en la pasinta monato aperas ne tiel ĝustatempe kiel ni dezirus, sed ni esperas, ke niaj legantoj pardonos al ni, ĉar tiu malfruo tute ne dependas de ni. Malgraŭ multfojaj petoj al niaj provincaj kunlaborantoj kaj societoj ni tre malfrue aŭ ofte tute ne ricevas sciigojn el la provincoj. Ne volonte eldoni „Polan Esperantiston” sen necesa laŭ nia opinio pola esperantista kroniko, ni ĉiam atendas pacience sciigojn el la provincoj kaj tio kaŭzas tiun ĉi bedaŭrindan malfrupon en la apero de nia organo.

Kiel agi en la estonteco, ni mem ne scias? Kiamaniere instigi niajn pro-

vincajn kunlaborantojn al pli energla agado, tiun ĉi demandon ni ofte starigis al ni, sed ĝis nun ĉiuj rimedoj estis malmulte efikaj. Kaj tamen Esperanto bone progresas en niaj provincoj. Ni ofte legas sciigojn pri tio en polaj journaloj kaj estas devigitaj laŭ ili verki kronikon. Ĉu efektive estas ne eble ŝanĝi tiun ĉi bedaŭrindan staton de la afero?

Ni ne opinias tion, ni tamen ne forte esperas, ke niaj samideanoj el provincoj komprenos la necesecon veni al ni kun helpo kaj disvolvos pli da energio por la esperanta afero en nia lando.

Redakcio.

Universala Ekspozicio kaj Monda Kongreso en Bruxelles.

I.

La Belga Registaro preparis por 1910 Grandan Universalan Ekspozicion en Bruxelles. En tiu Ekspozicio, speciala sekcio estos difinita por la grand-internaciaj asocioj kaj institucioj, kun la celo montri la progresojn faritajn en ĉiuj rondoj de la internacia organizado.

Ĉiuj internaciaj asocioj, unuiĝoj, societoj, oficejoj, institucioj, povas partopreni en tiuj Ekspozicio.

La objektoj elmontrotaj konsistos el tabeloj, diagramoj, statistikoj, foto-grafaĵoj, desegnoj, publikaĵoj, modeloj, k. t. p. Ĉiu objekto devos esti akompanata de priskriba noto.

Post klopodoj faritaj de la Esperantista Centra Oficejo, sekretario de la oficialaj institucioj de Esperanto, la organizantoj de la Ekspozicio akceptis, ke la lingvo Esperanto estu prezentata en tiu speciala sekcio de la Ekspozicio de Brukselo, kiel reprezentanto de la lingvo internacia.

Tiu prezentado de nia lingvo montruos ĉiujn verkojn kaj publikaĵojn pri la instruado kaj propagando de Esperanto en ĉiuj landoj kaj sciligojn historiajn kaj statistikajn pri la progresoj de nia afero, pri ĝia nuna stato, pri la servoj faritaj de nia lingvo kaj ĝiaj diversaj aplikoj.

Tiu ekspozicio okazos en speciale favoraj kondiĉoj, ĉar oni devos pagi nek la lokon okupitan, nek la elspezojn de gardado de la montrotaj objektoj. Restos nur pagotaj la elspezoj por la preparo, ornamo, transporto, enpakigo de tiuj objektoj, por la necesaj mebloj en kiuj oni montros ilin, kaj la salajron de oficisto, kiu donos klarigojn al la vizitantoj.

La Centra Oficejo, kiu prenas sur sin la alcentrigojn de ĉiuj montrotaj objektoj, petas ĉiujn esperantistajn instituciojn kiuj deziras partopreni al tiu grava Ekspozicio sciligi tion al ĝi, kaj sendi de nun la nomaron de la objektoj

sendotaj por tiu celo. Ĝi sendos pli malfrue, al la respondintaj personoj, detalajn klarigojn pri la sendo de tiuj objektoj kaj pri la elspezoj, kiujn ĉiu ekspozanto devos proporcie elporti.

II.

Dum tiu Ekspozicio okazos multaj internaciaj kongresoj, kaj inter ili, en la komenco, de la 9-a ĝis la 11-a de majo, Granda Kongreso de la internaciaj asocioj, nomita Monda Kongreso aŭ Kongreso de la Kongresoj, en kiu oni pritraktos ĉiujn demandojn komuninteresajn por tiuj asocioj kaj inter ili la demandon pri lingvo internacia.

Ni opinias, ke povas esti tre utile, ke ĉiuj esperantistaj internaciaj institucioj aŭ eĉ kelkaj naciaj estu reprezentataj en tiu Kongreso, al kiu povas aliĝi, ne nur la Asocioj, sed ankaŭ la Institutoj, Oficejoj, Gazetoj, kaj, kiel individua ano, ĉiu persono kiu interesiĝas pri la demandoj traktitaj de la Kongreso, kaj povas utile partopreni en ĝiaj laboroj, kaj eĉ la naciaj asocioj, kiuj havas internaciajn interesojn kaj povas grupiĝi internacie....

En la okazo, se, kiel ni esperas, vi sendas vian aliĝon, ni petas ke vi bonvolu tion sciligi al ni, por ke ni povu, eventuale, interkonsenti kun vi, pri la agmaniero en tiu kongreso de la esperantistaj organizaĵoj, precipe pri la demando de lingvo internacia. Pri tiu demando, ni intencas montri, en la Kongreso, la praktikecon kaj taŭgecon de nia lingvo Esperanto, uzante tiun lingvon por traduki la ĉefajn raportojn kaj dokumentojn de la Kongreso. Por tiu celo, estos tre utile, ke la Esperantistoj partoprenu multnombraj en la Kongreso.

Je la nomo de la Konstanta Komitato de la Kongresoj.

La prezidanto, Generalo Sebert.

La VI-a Internacia Kongreso de Esperanto.

Washington U. S. A.

14 — 20 de Aŭgusto 1910.

Cirkulero.

La Sesa Internacia Kongreso de Esperanto okazos en la urbo Washington, D. C. (Distrikto de Kolumbio), la Kapitolo de Usono, de la 14-a ĝis la 20-a de Aŭgusto, 1910-a.

Tia anonco mem devus sufiĉe certigi al vi ke „La Sesa“ superos ĉiun antaŭan kongreson, ĉar la amerikanoj estas famaj pri grandega maniero por fari aferojn, kaj oni povas konfidi je la usonanoj por fari la venontan kongreson la plej sukcesplena el ĉiuj.

Oni klopodas por aranĝi grandan kongreson, kaj la Organiza Komitato, kiu kontrolas ĉiun detalon de la laborado, konsistas el zorge elektitaj gesinjoroj, kiuj estas bone konataj pro siaj specialaj kapabloj, kaj ankaŭ pro sia entuziasmo pri la Internacia Lingvo Esperanto.

Kongreskartoj. La kongreskartoj, kiuj enlasos la posedantojn en la diversajn kunsidojn, amuzojn, k. t. p., oni povas aĉeti po kvin dolaroj (dek spesmiloj). Al ĉiu ĉeestanto ĉe la kongreso, kiu venos el iu alia parto de la mondo ol Norda Ameriko, la kasisto repagos la sumon de du dolaroj kaj duono (kvin spesmiloj) kondiĉe ke la karto estas aĉetita antaŭ la unua de Junio. Oni devas mendi sian kongreskarton de la Sekretario (ĉe la adreso sube) aŭ de la Centra Oficejo Esperantista, 51-rue de Clichy, Parizo.

Loĝado. La komitato pri loĝado, jam klopodas por speciala rabatprezo al kongresanoj. Washington estas fama pro sia gastemeco al vizitantoj. Ordinare oni povas loĝi en unua klasa hotelo po du aŭ tri dolaroj (kvar aŭ ses spesmiloj) por unu tago, ricevante loĝadon kaj manĝadon: kaj oni povas ricevi bonan loĝadon kaj manĝadon po ses aŭ ok dolaroj (dekdu aŭ dek ses spesmiloj) por unu semajno).

Transportado. Ĉar ni tute ne pov-

is lui en Usono ŝipon por la veturo de la Eŭropaj Esperantistoj, kiel oni sugestis, kaj ne povas aranĝi rabaton ĉar la ĉefoficejoj de la ŝipkompanioj estas en Eŭropo, la Organiza Komitato petis ke la Centra Oficejo Esperantista kaj la Universala Esperanto-Asocio aranĝu la vojaĝon, kaj anoncu planojn kaj koston en la Esperantistaj ĵurnaloj de Eŭropo. Ni povas certigi ke la kosto de Eŭropo ĝis Nov-Jorko duaklase, kiu estas sufiĉe luksa, estos proksimume kvindek dolaroj (cent spesmiloj). De Nov-Jorko ĝis Washington unuaklase kostas ordinare kvin dolarojn (dek spesmilojn), kaj por la kongresanoj rabato estos aranĝita.

Basbalo. Same kiel oni pensas pri Hispanujo, kiam oni aŭdas ion pri la konkurso de la toroj same kiel ĉies pensoj sin turnas al Svislando, kiam oni parolas pri montosportoj kaj al Anglujo kiam oni parolas pri „cricket“, tiamaniere ni nepre pensas pri Usono, kiam oni nomas basbalon, la „Grandan Amerikan Ludon“. En la daŭro de la Kongresa semajno okazos konkursoj de la „American Baseball League“ (besbol lig), kiu enhavas la plej lertajn ludantarojn el ĉiu parto de ĉi tiu kontinento. Amatoraj konkursoj inter lokaj ludantaroj ankaŭ okazos. Usonaj Esperantistoj ĉeestos kaj klarigos la ludon al la kongresanoj.

Akceptado. Washington'aj Esperantistoj, portante insignojn Esperantajn ĉeestos ĉe la stacidomo por renkonti vin kaj instrui vin pri la vojo k. t. p. Por zorgi pri la kongresanoj el Eŭropo, speciala komitato Nov-Jorka iros por renkonti ĉiun vaporŝipon sur kiu ni scias ke Esperantistoj venas, kaj se iuj Eŭropaj Esperantistoj sciigos nin ke ili venos al Boston aŭ alia haveno, ni aranĝos ilian akceptadon.

Ekskursoj. Krom postkongresaj

ekskursoj, pri kiuj oni nun ne povas plene sciigi, ni aranĝos grupon por viziti la multnombrajn belajn konstruaĵojn, parkojn, k. t. p., en kaj ĉirkaŭ la urbo. El tiuj ĉi Washington havas pli multajn kaj pli belajn, kvankam ne tiel malnovajn, kiel iu ajn alia urbo en la mondo. Ĉi tiuj grupaj ekskursoj estos kondukita de lokaj Esperantistoj.

Poŝtkartoj. La komitato jam eldonis specialajn poŝtkartojn de Washington'aj vidindaĵoj portantajn plenan priskribadon Esperante presitan. Ĉi tiujn oni povas mendi de la Sekretario po dudek kvin cendoj (duono da spesmilo) por dek kvin poŝtkartoj. La profito el ĉi tiuj estas enspezata de la Sesa Kongreso.

Kongresmarkoj. La komitato jam eldonis tre belajn kongresmarkojn, kiujn oni povas mendi de la Sekretario po dudek kvin cendoj (duono da spesmilo) por cent markoj. La profito estas enspezata de la Sesa Kongreso.

Literatura konkurso. La dua Kongresa Literatura Konkurso okazos (kiel la unua en 1909-a, tiel sukcese okazinta en Barcelona) en la daŭro de la Kongresa semajno. Ĉiuj personoj, societoj, redakcioj, k. t. p., kiuj bonvolos proponi temojn kaj doni premiojn, estas urĝe petataj ne nur detale informi la prezidanton de la komitato pri la konkurso (D-ro Ivy Kellerman-Reed, The Lamont, Washington) aŭ la Sekretarion de la Organiza Komitato, sed ankaŭ samtempe publike anonci per gazetoj, k. t. p. ke tiaj temoj kaj premioj estas proponitaj al la komitato. Se specialaj juĝantoj estas postulataj bonvole anoncu tion, kune kun la nomoj kaj adreŝoj de la specialaj juĝantoj elektitaj. Ĉiu manuskripto juĝota de la Kongresaj Juĝantoj devos esti ricevita en Washington antaŭ la 1-a de Julio, 1910-a. La Organiza Komitato proponas la jenajn temojn kaj donacos medalojn al la premiltoj:

1. Por la plej bona prozaĵo (de 1000-2000 vortoj) pri la Universa Frateco).

2. Por la plej bona poezio (de 20-50 linioj) pri la Universa Frateco.

3. Por la plej bona rakonto (originala prozaĵo de 2500-3000 vortoj).

4. Por la plej bona rakonto (originala prozaĵo de 2500-3000 vortoj) verkita de junulo aŭ junulino inter la aĝoj de dek kvin kaj dudek jaroj. Aliaj temoj kaj premioj, kaj ankaŭ la reguloj de la konkurso, estos anoncataj en sekvontaj cirkuleroj, kiujn la Sekretario sendos al iu kiu sendas nomon, adreson kaj poŝtmarkon.

Survoje al Washington.


Sendube la plimulto de la Eŭropaj Esperantistoj elŝipiĝos ĉe Nov-Jorko, kaj de ĉi tiu urbo veturos al Washington per la fervojo. Nov-Jorko estas la plej populita urbo krom unu en la mondo, kaj enhavas multajn unikajn vidindaĵojn. Oni devus vidi la tre altajn konstruaĵojn, unu el kiuj havas kvardek du etaĝojn; la parkon longan kvin mejlojn ĝuste en al centro de ĉi tiu urbego. Sur la ekstera muro de unu alta konstruaĵo estas horloĝo kies diametro estas preskaŭ dek du metroj. La akvario de Nov-Jorko estas la plej bona en la mondo, eĉ pli bona ol tiu fama akvario en Neapolo.

Eminentaj Esperantistoj de diversaj landoj ĉeestos, kaj D-ro Zamenhof diris ke li certe venos. Decidu ke vi ankaŭ venos al Washington kaj partoprenos en la Sesa Kongreso. Skribu tuj kaj mendu vian kongreskarton, poŝtkartojn, markojn, kaj petu iun ajn deziratan sciigon.

Adresu: Edwin C. Reed, Sekretario de la Sesa Kongreso de Esperanto, Washington, D. C., Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko.

P. S. Oni povas pagi por Karto, k. t. p., per ĉeko de la Ĉekbanko Esperantista.

Kongresa Komitato.



Unua Internacia Kongreso de katolikaj Esperantistoj.

(Parizo, 31-an Marto---3-an Aprilo 1910).

Laŭ la sciigoj ĝis nun ricevitaĵ pri ita kongreso ni povas diri, ke tiu ĉi unua speciala esperantista kongreso sukcesis tute bone. Pri tio ni gratulas ĝiajn iniciatintojn kaj organizintojn, kiuj en tre mallonga tempo sukcesis aranĝi sufiĉe imponantan kongreson. Unu el la partoprenintoj kun kiu ni havis okazon malmulte paroli restis ravita de ĝia imponeco, soleneco kaj simpatia karaktero.

Jen kiel priskribas en la Revuo S-ro Carlo Bourlet siajn impresojn el la kongreso.

„Merkredon, 30-an de Marto je la naŭa vespere, amaso da verdsteluloj eniras mallarĝan pordon en la strato Vaugirard, en Parizo. Flagoj francaj, papaj kaj esperantistaj ornamas la enirejon. Grandaj afiŝoj prezentantaj la Sanktan Virgulinon, kiu tenas esperantan standardon, estas gluitaj sur la muroj.

En la korto briĝas fenestroj. Ni tiu en iru. Ĝi estas la granda festhalo de la Katolika Instituto. Funde troviĝas estrado, en kies mezo sidas en sia violkolora sutano Monsinjoro Boudrillart, la scienca kaj eminenta rektoro de l' Instituto (Katolika Universitato). Ĉirkaŭ li sidas imponanta anaro da diverslandaj pastroj kaj laikoj: nia fervora amiko pastro Austin Richardson, nia nova entuziasme bolanta kunbatalanto pastro Duvaux, Baronino de Ménil, la nelacigeble sindonema kassistino de la kongreso, S-ro Gustav Gauterot, profesoro de historio en la Katolika Instituto, S-ro Claudius Colas, la sentima iniciatinto de tiu rimarkinda Kongreso, F-ino Laroche, la agema abelo de tiu kunveno kaj multaj nefrancaj katolikaj pastroj, inter kiuj ni citos nian malnovan famekonatan samideanon pastron Dombrowski, fraton Isidoro, la grandan apostolon de Esperanto inter blindaj junuloj, pastron Parker, parohestro en Wexfordt (Irlando), pastron Bianchini el Italujo kaj energiajn agemajn samideanojn el Holando.

La hele lumigita kaj bele ornamita ĉambrego estas superplena de la 400 katolikaj kongresanoj, al kiuj aliĝis multaj scivolemaj ĉeestantoj. Ŝajnas al mi, ke partoprenas en unu el niaj grandaj mondkongresoj, en kiu la plejmulto de la vizaĝoj estas nekonataj. Sama soleneco, sama fervoro, sama entuziasmo, samaj paroladoj, sama vicveno de diversnaciaj reprezentantoj, kiuj en nia kara lingvo eldiras sian fidon al la Katolika Eklezio kaj al Esperanto.

En la katolikaj gazetoj oni povos legi detalan raporton pri la diversaj elokventaj oratoradoj, kiujn ni aŭdis. Ĉi tie mi nur volas doni mian personan impreson.

La ĉefa parolado estas farita de S-ro profesoro Gauterot, kiu altspirite klarigis por la ĉeestantoj neesperantistoj, kial la katolikoj devas fariĝi esperantistoj. Tiu belega literatura peco estas eldonita de la Kongresa Komitato, kaj ŝajnas al mi, ke ne estas eble, ke niaj katolikaj samideanoj trovu ian propagandilon pli perfekte taŭgan ol tiu rimarkinda broŝureto.

„Ni estas esperantistoj, — li diras, pro tri ĉefaj motivoj: la universaleco de nia religio, la bezonoj de nia socia agado, kaj la neceseco ke ni observu, eĉ antaŭlu la malamikojn de la kristana civilizacio sur la kampo, kie ili esperis rikolti decidigajn venkojn....”

„Ni volas kredi, ke la nekredantoj, kiuj, ne partoprenante nian fidon, tamen partoprenas nian amon al la vero, estos feliĉaj pri la penado, kiun ni faras por ĝin atingi kaj ni estas certaj, ke el ĝi ili ricevos profiton”.

Dum kvar tagoj la kongreso orde me kaj efike laboris. Ĝi estis mirinda, neesperebla sukceso kaj la rezultatoj akiritaj estas nekalkuleblaj. Celinte nur la katolikan mondon, kaj plej bone trafinte, niaj katolikaj samideanoj samtempe donis al nia ĝenerala afero fortegan antaŭenpaŝon.

Ili ankaŭ donis al ni ĉiuj imitindan ekzemplon”.

Jen kelkaj impresoj de la eminenta direktoro de la Revuo. Ni povas aldoni, apogante nin sur la rakonto de alia partoprenisto ke la impreso estis efektive tre forta kaj ĉiuj ĉeestintoj disiĝis kun plej simpatiaj rememoroj kaj prifortigita fervoro por daŭrigo de nia komuna afero.

Dimanĉo, la 3-an Aprilo estis la fermtago de l' kongreso. Je la 10-a matene estis Diservo kun kantoj en la kapelo de la katolika Instituto; predik-

is en Esperanto Pastro Parker. Je la 3-a posttagmeze oni kunvenis en la Baziliko de Montmartre kaj tie kantis „Ni volas Dion” kaj la „Salve”. Post la ceremonio oni grupigis la partoprenantoj por fotografado.

„Tia grupo kun la verda standardo”, skribas „Le Monde Esperantiste”, altiris multajn scivolulojn kaj profitante la okazon S-ro Colas klarigis al ili, kio estas Esperanto, kies venko estos baldaŭ definitiva. La publiko ovaciis lin. Poste oni disiĝis kun krioj „Vivu la Duce”.

P. E.

Raporto pri unua tutrusa esperantista kongreso

(*prilaborita laŭ rusaj gazetoj*).

Preskaŭ en ĉiuj petersburgaj gazetoj aperadis rimarkoj kaj artikoloj pri la unua tutrusa kongreso.

Kelkaj el ili donis mallongajn raportojn, rakontante nur faktojn, aliaj presis pli aŭ malpli longajn artikolojn, aldonante siajn impresojn kaj ankaŭ opiniojn pri esperanta afero.

Antaŭ ĉio ni raportos pri la kunveturo, pri ĝia ordo, poste pri kelkaj rezolucioj kaj, fine, pri impresoj kaj ĝeneralaj opinioj.

I.

La kongreso daŭris en Petersburgo de la 20-a ĝis 25-a de Aprilo (de la 3-a ĝis 8-a Majo laŭ nova stilo).

Marde, la 20-an de Aprilo la kongresanoj alvenis Petersburgon el diversaj rusaj urboj, generale el Moskvo. Tiu ĉi unua tago estis dediĉita al reciproka konatiĝo de samideanoj. Al tiu ĉi neoficiala kunveno estis oferita la salono de „pli altaj virinaj kursoj” de S-ro Rajev. El pli eminentaj esperantistoj ĉeestis: d-ro Korzliniski, glora lingvisto Evstifejev, la eldonisto Saĥarov, S-roj Sĉavinski, Postnikov, Vasilkovski, poetoj—Devjatnin kaj Lojko.

La sekvantan tagon vespere je 8 horo okazis malfermo de la kongreso

kaj komuna kunveno en la granda luksa Aleksandra salono de la petersburga magistrato (urba Dumo).

Matene tiun ĉi tagon alvenis el Varsovio Petersburgon d-ro L. L. Zamenhof, kiu estis solene renkontita ĉe la stacidomo de plej eminentaj esperantistoj.

En aparta ĉambro salutis la alvenintan majstron reprezentantoj de diversaj grupoj, kaj la rusa esperanta ligo donacis al li oran signon.

La majstro, respondante al ili, ne kaŝis sian ĝojon pri sia unua vizito en la ĉefurbo kaj dankis kore por la varmaj vortoj de la parolintoj.

Fortan impreson elvokis la parolado de la reprezentanto de studentoj en la petersburga universitato:

„Akceptu kaj nian donacon, sed ne atendu de ni ion karan: oron, arĝenton, juvelojn. Ni donas Hanibalan jurpromeson—en la daŭro de nia vivo labori por Esperanto kaj por la esperanta idealo”.

Vespere je la 8 horo estis oficiale malfermita la kongreso, en kiu partoprenis pli ol 700 esperantistoj kaj gastoj. Super la estrado pendis esperantaj flagoj kun verdaj steloj sur blanka kampo. Apud la enirejo oni vendis es-

perantajn librojn, broŝurojn, poŝtkartojn kaj eĉ esperantan ĉokoladon.

La kongresanoj renkontis la majstron per tondraj ovacioj, kaj improviziĝita ĥoro el esperantistoj ekkantis solenan himnon.

En la mezo de l' estrado sidis d-ro Zamenhof, havante apud si la reprezentantojn de la kongresa komitato S-rojn: kapitanon Postnikov, Vasilkovski, Dievjatnin, la senatoron A. Ivanicki, la poŝtdirektoron A. Stetkieviĉ, N. Korzliński, S-inon Barabanov kaj aliajn.

D-ro Zamenhof estis elektita, kiel honora prezidanto de la kongreso.

La kongreson malfermis S-ro Postnikov, prezidanto de la tutrusa esperanta ligo, per propaganda parolado, poste sprite parolis S-ro Vasilkovski, redaktoro de „Rusa Esperantisto”. Li memorigis, ke sur la terglobo antaŭ konstruo de la Babelturo ekzistis jam komuna lingvo kaj proponis saluti d-ron Zamenhof, kiu efektivigis la revon de ĉiuj popoloj.

D-ro Korzliński paroladis je la nomo de la moskva esperanta societo, D-ro Miroviĉ — je la nomo de Pirogova kongreso. Ili paroladis ruse.

Poste parolis esperante D-r. Zamenhof. Li parolis pri la neceso de artefarita lingvo, kaj ke nur tia lingvo povas unuigi popolojn kiujn dividis fortaj naciaj tendencoj. Lia parolado estis akceptita per laŭtaj kaj bruaj aplaŭdoj.

Ĉe tiu okazo mi rememoras tre instruan kazon: ankoraŭ dum la haga packongreso, japana reprezentanto rifuzis paroladi en diplomata francalingvo, dirinte, ke japana lingvo ne estas pli malbona ol gala lingvo.

Poste sekvis multaj salutaj paroladoj; la kunveno finiĝis ĉirkaŭ noktomezo.

El multenombraj salutotelegramoj ni citas la sekvantajn: de la internacia esperanta akademio, de la belga esperanta rondeto, de la societo de teatraj lernejoj, de esperantaj rondetoj, de militinstruaj institucioj kaj societoj, de rusa ĵurnalo „Sciiganto de sciigado” ktp.

En la fino de l' kunveno estis sendita salutotelegramo al Leo Tolstoj, kiu aprobis Esperanton, kiel la rimedon por proksimigo de la homaro.

